nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2014

## ESPERANTO EN LA FOIRO DE LA SOCIA EKONOMIO

Madrida Esperanto-Liceo, kune kun Hispana Esperanto-Federacio, partoprenos la 2-an Foiron de la Socia Ekonomio de Madrido, kiu disvolviĝos inter la 31-a de majo kaj la 1-a de junio en la Kultura Centro *Matadero* (Paseo de la Chopera, apud placo kaj metrostacio Legazpi). Diversaj madridaj esperantistoj deĵoros dum tiuj du semajnfinaj tagoj, inter la 10-a kaj la 21-a horoj.

Temas pri evento fariĝinta referenco de la entreprenoj kaj organizaĵoj partoprenantaj la movadon de la Solidara Ekonomio en la ĉefurbo kaj ĉirkaŭaĵoj, kaj esplorantaj novajn formojn de alternativa interrilato. Oni povas legi plu pri la karaktero kaj la celo de la evento, hispanlingve, en la retejo de la Foiro http://laferiamadrid.mercadosocial.net.

Ni invitas niajn amikojn kaj simpatiantojn viziti nin dum la Foiro. Ni disponos je budo, en kiu ni montros diversan materialon pri la lingvo, ni disdonos broŝurojn, kaj ni informos pri Esperanto kaj ĝia movado. Ni ankaŭ instigos aliĝon al kursoj kaj disponos je diversa materialo de MEL por vendi specialpreze.

Ni atendas vin!

## VIZITOS NIN

Kiel ni informis en pasinta numero, dum monatoj junio kaj julio vizitos Hispanion por sekvi la Pilgriman Vojon de Sankta Jakobo, samideanino el Japanio, Taeko Osioka. Ŝi alvenos Madridon la 3-an de junio, frumatene, kaj je 10,45 vojaĝos aŭtobuse al Navaro. Ŝi revenos al Madrido la 19-an de julio kaj foriros al Japanio la 24-an. Dum tiuj tagoj en Madrido ŝi gastos ĉe esperantistoj, kaj ni provos organizi rendevuon pli ampleksan.

Ŝi jam aranĝis aliajn rendevuojn sur la Vojo kun esperantistoj el Pamplono, Burgoso kaj Leono. Aliaj samideanoj en aliaj jakobaj urboj povas kontakti nin por informiĝi pri la kalendaro.

Laŭ informo de Lee Jungkee, Esperanto-amiko s-ro Urso kaj du familianoj planas viziti Madridon fine de junio por turismi. Ili jam havas privatajn planojn por kelkaj tagoj, sed ili bonvenigos akompanon de esperantistoj por la 27-a de junio. Oni aranĝos renkontiĝon por vespero, sed se esperantisto povas akompani ilin ankaŭ matene, tio estus dankinda. Bv. kontakti Liceon por tion organizi.

Alia korea amiko Youngung Kim (esperante *Heroo* kaj hispane *Esteban*) anoncis sian venon al Madrido en oktobro, por studi. Li jam informis ke tre plaĉos al li se li povos renkonti samideanojn en la urbo Madrid kaj la ĉirkaŭaj lokoj.

Brazila junulo Gabriel Calegari, kiu studos en Barcelono ĝis aŭgusto, anoncis ke li vojaĝos al kelkaj partoj de Hispanio en julio, interalie Madrido, Granado kaj Bilbao. Li estas kontaktebla per Fejsbuko. Ni informos kiam li venos en Madridon, fine de julio, por organizi alian renkontiĝon.

## ĜUI LA HISPANAN KONGRESON RETE

La 73-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu kune kun la 18-a Andaluzia Kongreso disvolviĝis en la urbo Arundo (Ronda) inter la 1-a kaj la 4-a de majo 2014, estas nun ĝuebla en la reto por tiuj kiuj ne povis ĝin partopreni. Dum tiuj ĉi tagoj filmetojn tie registritajn oni iom post iom montras en la jutuba kanalo de Hispana Esperanto-Federacio http://www.youtube.com/user/esesperanto.

Diversaj kulturaj kaj distraj programeroj spekteblas en tiu kaj aliaj kanaloj de Jutubo; ekzemple, multaj el la pecoj de la spektaklo *"Vivu la teatro"* gvidita de niaj samurbanoj Miguel Fernández kaj Ana Manero. Muzikaj koncertoj, inklude de la neesperantistaj flamenkaj kaj alandalusaj organizitaj dum la Kongreso, aperas ligitaj en tiu adreso. En kanalo "Ekstremoj" spekteblas la pecoj kantataj en Esperanto de la fama popkantistino María Villalón, ekzemple "La pluvo" http://www.youtube.com/watch?v=fOBkKcbJUAE.

Kiel anoncite, sine de la kongreso disvolviĝis la "1-a Konferenco pri instruado de Esperanto, en Hispanio kaj la mondo", kun diversaj prelegoj, kunsidoj, kursoj kaj ekzamenoj. Ĉefa rezulto de ĝi fariĝis la refondado de la instruista fako de Hispana Esperanto-Federacio. Bonvolu kontakti kun HEF se vi volas kunlabori en ĝi.

## BIERO

En Toledo, ligita al anarkiismaj rondoj, kreiĝis kooperativo de bierfarantoj nomata "Speranto". Unu el iliaj bieroj nomiĝas "Zamenhof", kaj ĝi estis prezentita meze de majo en librejo "La libre de barrio" en Leganés. Pliaj informoj: https://www.facebook.com/bassbeer1.

## EDZIĜO

Nia samurbano kaj samgrupano Pedro Hernández edziĝis pasintan sabaton la 24-an de majo, kun Balogi, el Bocvano. Ilin akompanis kelkaj esperantistaj amikoj. Gratulon!

## KURSOJ EN LA SIDEJO

La kursoj kiujn gvidas Juan del Castillo disvolviĝos plu dum junio en la sidejo de MEL (strato Rodríguez San Pedro, 13), sabate matene.

## KUNVENOJ KAJ BABILRONDOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL, plu okazas ĉiulunde post la 18,30, sed estas intenco provi fari niajn klubajn kunvenojn iom pli efikaj por ekzercado de la lingvo. Tial, anstataŭ paroli pri la vetero aŭ pri la prezo de la melongenoj, konvenas antaŭfiksi iun temon, prefere iun etan tekston sur kiu ni povos elverŝi komentojn, ĉu pri-lingvajn, ĉu pri-enhavajn.

Por la lundo 9a estas proponata la du-paĝa rakonto "Mirakloj", aperinta en la februara numero de *Monato*. Por sekvaj lundoj ni elektos inter la proponoj de la kunvenantoj.

Aliflanke, la unua sabato, la 7-an de junio, okazos la kutima eksterkluba babilrondo. Oni proponis ĉifoje ĝin organizi en parko. Atentu postajn informojn pri loko kaj horo.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj kaj detaloj pri renkontoj kaj aliaj vizitu regule la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, la retejon de MEL ĉe la adreso http://www.esperanto.es/mel aŭ la grupo en la socia retejo Fejsbuko (*Facebook*), https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com